

Usono: Ĉi tiun lingvon vi ne uzu!



**Litovio:
libereco – festinda
eĉ post 20 jaroj**

***Toyota:*
reputacio
revokita**

**Migrado
multmilionara**

s honestaj kaj ka-
plej fortaj gar-
Pro tio ili estas
ataj homoj sur nia
aroj ne povas to-

Germanio inter la
ĵurnalisto devis
, sed tute aparte
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt
elokventan voĉon
fuzis fuĝi, ĉar li
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele
Kvazaŭ ĉio
dependus de mi

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi



FEL

Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulto epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la leviĝantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - rebutiko@fel.esperanto.be

Eksterlanda politiko: ĉu etika aŭ pragmata?

Belgio ankoraŭ konservas fortajn ligojn kun sia ekskolonio Kongo. Granda parto de la belga evoluhelpo fluis al tiu lando. Sed la rilatoj ofte fluktuis pro belga malaprobo pri misituacioj en Kongo.



12

Migrado multmiliona



14

Ne pro Valentino-tago hastis ĉinoj antaŭ la 14a de februaro al siaj hejmlukoj, sed pro la tradicia printempa festo. La festo varias ĉiujare inter la lasta tagdeko de januaro kaj la dua tagdeko de februaro kaj okazas la unuan tagon de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Sep tagojn ĉinoj festas.

Kiun poŝlegilon mi akiru?

La merkato de elektronikaj libroj fulme grandiĝas, sed oni ne povas legi ilin sen aparato. La elekto estas tre granda, kaj la gamo estas dividebla en tri grandajn grupojn: poŝlegiloj, kiuj konvenas nur aŭ ĉefe por legi librojn (ekzemple Sony Reader); poŝkomputiloj kaj lertaj poŝtelefonoj, kiuj taŭgas ne nur por legi librojn, sed ankaŭ por telefoni, retumi kaj multe pli (ekzemple iPhone); kaj ordinaraj teko- aŭ tablo-komputiloj.



18

politiko

JAPANIO	8
Bruo pribrua	
POLLANDO	8
Elektioj pli fruaj	
BELGIO	9
Malnova problemo pri maljunaj homoj	
KOMUNISMO	9
Sekretoj eltombigitaj	
JAPANIO	10
Fluginte bankroten	
JAPANIO	10
Reputacio revokita	
LITOVIO	11
Libereco – festinda	
eĉ post 20 jaroj	
BELGIO	12
Eksterlanda politiko: ĉu etika aŭ pragmata?	

moderna vivo

LINGVOPOLITIKO	13
Energie lernante	
ĈINIO	14
Migrado multmiliona	
AŬSTRIO	16
Mordaj demandoj	
HOMAJ RAJTOJ	16
Ĉi tiun lingvon vi ne uzu!	

komputado

PROGRAMARO	17
Knoppix	
DE GUTENBERG AL IPAD	18
Parto 2:	
Kiun poŝlegilon mi akiru?	

arto

Plia sukceso de	
Jacques Yvert	20

novelo

La malĵaluzo de Klorinda	21
--------------------------------	----

libroj

Frandaĵo por kleruloj	24
-----------------------------	----

ŝerco kaj satiro

PRIVINTRA MEDITADO	26
Varmbotelo	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Pufigado



Diskutado estas karakteriza por demokratio. Oni interŝanĝas argumentojn por kaj kontraŭ iu ideo kaj plano, el la diskutado estiĝas fine kompromiso, ekzemple por leĝoprojekto. Sed en Germanio ne plu okazas diskutoj: amaskomunikiloj karakterizas ĉiun argumentadon kiel disputon aŭ kvieron. Por bulvardaj komunikiloj ŝajne ordinara diskuto ne estas interesa; tial oni pufigas ĉiun temon, ĉar tio ebligas pli krian ĉeftitolon. Poste ili miras, ke opinisondoj montras, ke civitanoj abomenas kvierojn de partioj.

Alia fenomeno de tia pufigado estas tujeco. Ĉar praktike ĉiu posedas poŝtelefonon, homoj tuj informas, kiam ili rimarkas ion nekutiman. Mi miris, ke nun la radio informas ĉiutage kelkfoje pri aŭtomobiloj, kiuj veturas en kontraŭa direkto sur aŭtoŝoseo kaj tiel kaŭzas koliziojn. Ĉu vere tiom multiĝis tiuj idioj? Kiam mi esploris tiun problemon, mi eksciis ke efektive en Germanio tute ne plioftiĝis tiu fenomeno, sed ke aŭtanoj multe pli ofte informas

la policon kaj radiostaciojn pri malĝuste veturantaj aŭtoj. La radioredaktoroj klarigis, ke kompreneble ili tuj diskonigas la informon, ĉu veran, ĉu neveran; preferi ili volas tro ofte averti ol riski mortojn pro akcidento. Nu, tian pufigadon oni ja povas toleri, ni nur konsciu pri la vera situacio por ne timi, ke nun nepras tute eviti la aŭtoŝoseojn.

Vere superfluan pufigadon ni spertis dum la ĉi-jara vintro en la norda hemisfero. Amaskomunikiloj plendis pri „vintrokatastrofo“ kaj „neĝoĥaoso“, kvazaŭ tuj pereos la mondo. Homoj! Estis tute normala vintro, kaj dum vintro neĝas kaj frostas en Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Ŝajne oni simple forgesis tion, ĉar dum kelkaj pasintaj jaroj pro la klimatsanĝo ni havis eksterordinare varmajn vintrojn. Pri tia histerio oni nur povas moki, sed pufigado ofte estigas ankaŭ severajn sekvojn. Kiam tre populara germana futbalisto mortigis sin pere de rapid-trajno, gazetoj pufigadis la temon priskribante ĉiun detalojn de tiu tragedio. Oni povis legi tion kvazaŭ instrukciojn pri sukcesa maniero mortigi sin. Efektive konsiderinde kreskis la nombro de tiumentodaj memmortigoj; ene de la sama monato ĝi pli ol kvarobliĝis. Pri tiuj (nepopularaj) viktimoj amaskomunikiloj ne raportis ...

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoĵoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.

Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzel-langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano
de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Naturo de scienco (2)

Estas pli ol evidente, ke la kvantum-teorio kaj la relativeteorio ankoraŭ plene aplikeblas, same kiel la leĝoj de Newton (responde al Bruce Sherwood, MONATO 2010/4, p. 6)! Se ne, oni devus fermi la pliparton el la laboratorioj pri mikrofiziko kaj la uzinojn, kiuj okupas sin pri spacveturado aŭ artefaritaj satelitoj. Kion mi ja celas, estas, ke ambaŭ teorioj perdis sian validecon kiel *definitiva paradigmo*, kaj ke nova paradigmo, pli ampleksa kaj enprena, ol la antaŭa, nun necesas. Ĝuste tion mi provas demonstri en mia *Teorio pri ĉio* en Interreto. Mi invitas la estimatan Bruce spekti ekzemple la dokumentan filmon *Who's afraid of a Big Black Hole?* (Kiu timas grandan nigran truon?) en la televida serio *Horizon* de BBC, kie parolas kolegoj liaj kun pli da prestiĝo, ol povra mi.

Manuel HALVELIK
Belgio

Ĉefa lingvo

En MONATO 2010/4, p. 15-17, Jean Pierre VandenDaele mencias la satelite kapteblajn radio- kaj televid-staciojn. Li bone mencias dekojn da ili, sed strange, li tute ne mencias tiujn albanlingvaj, kiuj kovras jam teritorion kaj loĝantaron (almenaŭ sepmilionan), ne malpli ol tiu de la ceteraj balkanaj landoj. Temas pri pluraj tutlandaj kanaloj kiel TOP Channel, KLAN, VIZION PLUS, RTSH, en Albanio; RTK, RT21, KLAN KOSOVA en Kosovo; ALSAT en Make donio kc. Ĉu li ankoraŭ ne scias, ke la albana estas unu el la kvin ĉefaj lingvoj de la malnova kontinento?

Bardhyl SELIMI
Albanio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila plurlado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta strat-adreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Dekstrismo en demokratio

Vinko OŠLAK

Estas du politikaj principoj, kiuj povas funkcii nur en kompleto: la principo de demokratia pluralismo kaj la principo de jura ŝtato. Se la ŝtato estas nur jura, ĝi fakte estas diktaturo; se ĝi estas nur demokratia, ĝi fakte fariĝas anarkio. Kiel konate ekde Aristotelo, anarkia oĥlokratio (= regado de la plebo) per sekva paŝo nepre fariĝas tiranio.

Protestoj kaj denuncioj

Pasis dek jaroj post kiam en Aŭstrio el la parlamenta baloto rezultis registara koalicio de dekstra *Volkspartei* (kristandemokrata popolpartio) de Wolfgang Schüssel [volfgang ŝisel] kaj de „ekstrema dekstra” *Freiheitliche Partei* (libereca partio kun forta naciisma marko) de pasintjare mortinta Jörg Haider [jerg hajda]. Tiam la aŭstra socialdemokrata partio ne nur lanĉis protestojn nur enlande, sed denuncis la propran landon ankaŭ ĉe eŭropaj instancoj kaj kunprovokis tiel nomatajn eŭropajn sankciojn kontraŭ Aŭstrio – sed ne nur kontraŭ la dekstre orientita registaro, sed ĉefe kontraŭ la civitanoj, kiuj dum ne tiel mallonga tempo sur propra haŭto devis suferi la malbonan etoson kontraŭ Aŭstrio en la okcidentaj landoj de Eŭropo. Kaj la tuta Eŭropo tiam komencis uzi la ne tre inteligentan sintagmon „ekstrema dekstro”, kiu teorie estas konata jam el la 20a jarcento, sed neniam antaŭe fariĝis parto de ĉiutaga politiko.

Interesa fenomeno estas, ke oni preskaŭ neniam parolas pri „ekstrema maldekstro”, sed konsekvence kaj ĉie nur pri „ekstrema dekstro”. Jam nur per tio la uzo de tiuj ĉi vortoj perdas la tutan aŭtentecon. Finfine la tiranioj maldekstraj estis kaj plu

estas multe pli ampleksaj kaj sistemotalecaj ol la tiranioj dekstraj. Oni niatempo ne havas polusan dekstran kontraŭekzemplon de la reale ekzistanta maldekstra tiranio en Ĉinio, por ne paroli pri Norda Koreio. Tamen oni daŭre mencias kiel ion apriorie politike malbonan kaj neakcepteblan la „ekstreman dekstron”.

Kio estas „ekstrema”?

Ĉu „esti ‘ekstrema’” en la prisocia, pripolitika, priŝtata monpercepto, filozofio aŭ ideologio estas morala aŭ jura kategorio? La politikaj partioj, kiuj konsistigis la eŭrope sankciitan aŭstran registaron, ne troviĝis eksterleĝe, ili estis partioj provizitaj per demokratie akiritaj balotvoĉoj.

„Esti filozofie, ideologie kaj politike ‘ekstrema’”, ĉu dekstre ĉu maldekstre, do ne povas esti jura (aparte ŝtatjura). Se iu politika partio estus ŝtatjure neakceptebla, ĝi simple estus malpermesita, kiel dum certa tempo en okcidenta Germanio estis malpermesitaj ne nur la nazia, sed ankaŭ la komunista partio (pli precize: unu el du ekzistantaj), aŭ kiel en ĉiuj eŭropaj landoj estas malpermesitaj naziaj partioj.

Ĉu tamen ili estas malpermesitaj pro sia „ekstremeco”? Se jes, tio signifus, ke oni tuj povus fondi novan nazian partion, oni nur devus ĝin proklami mezburĝa kaj neekstrema. Ne nur tio; tio signifus, ke naziaj filozofio, ideologio kaj politiko estas neakcepteblaj por demokratia kaj jura ŝtato, nur ĉar ili estas „ekstremaj” kaj ne pro siaj filozofia, ideologia kaj politika enhavoj kaj intencoj. Mi dubas, ke iu ajn konscia homo estus preta aprobi tian sintenon: nazia partio – kial ne, se ĝi ne estas ekstrema ...

Morala kategorio?

Ĉu „esti politike ‘ekstrema’” do estas eble morala kategorio, kiam evidente jura kaj ŝtatjura kategorio ĝi ne estas? Oni ne devas esti scienca kunlaboranto en la fizika instituto pri mezuroj en Germanio por kompreni, ke oni povas difini ekstrecojn, nur se oni havas difinitan centron, kaj inverse, oni povas difini centron, nur se oni havas difinitajn ekstremajn poziciojn. Ĉar en la politiko la sunsistemo ne ekzistas kaj tiel ne estas anticipe donita la centro, oni povas ĝin difini nur el la pozicioj de la ekstrecoj. Se iu saĝulo volas elimini, prikaŝi aŭ ignori la ekstrecojn, neniu povas sin plu preni por la centro. Tiel, antaŭ ol demandi pri etiko, do filozofio pri moralo, oni jam el pura logiko scias, ke ekstrecoj en la politiko ne povas esti moralaj problemoj, same kiel ili ne estas problemoj juraj kaj ŝtatjuraj.

La vera problemo

La vera politika problemo estas ne ekstreco – tiu estas privata afero de la protagonistoj – sed leĝeco kaj honesto de partioj kaj unuopuloj. Se iu partio iras tro ekstreman, ĝi per tio perdas aprobon ĉe la civitanoj kaj perdos baloton. Tio, kio estas vera morala kaj jura problemo, estas krimaj agoj kaj malobservo de leĝoj. Ĉi-momente en Aŭstrio (sub maldekstra koalicio) la politikistoj, ekde la kanceliero ĝis la ministrino pri juraj aferoj, laŭte diras, ke por efektiviĝi leĝon oni bezonas interkonsenton kun la politikaj subjektoj en la provincoj. Tio estas esenca atako al ambaŭ principoj de la respubliko. Ne la ekstreco orientitaj partioj kaj politikistoj subfosas la respublikon, sed la mezaj, interkonsentaj, kiuj fajfas pri la leĝoj. ■

Bruo pribrua

La lan de marto mi vojaĝetis en mia urbo, vizitante konstruaĵojn kaj memoraĵojn kiuj postvivis la japanajn militojn. Tiel mi min preparis por la planata ĉi-tema ekskurso. Mia vojaĝeto estis agrabla kaj fruktoplena krom unu afero: bruegoj de usonaj ĉasaviadiloj.

La tago koincidis kun la memortago pri Bikini. En 1954 Usono eksperimentis per hidrogena bombo ĉe la atolo Bikini. La eksplodo estis pli granda ol atendite kaj sur japanajn fiŝkaptistojn falis radioaktivaj cindroj. Suferis multaj pro radioaktiveco kaj mortis unu fiŝisto.

Pro la datreveno okazis en la patrina haveno de la mortinta maristo memorkunsido.

Ŝajnis al mi, ke per tiu ĉi arbitra flugado de ĉasaviadiloj Usono volas subpremi la pacmovadon kaj elmontri sian hegemonion sur Japanio.

Protestis

Ne nur la lan de marto, sed jam de kvin jaroj flugas usonaj ĉasaviadiloj super Japanio. Jam 24 gubernioj protestis al Usono kaj al la japana registaro, tamen vane.

La bruoj, kiujn mi aŭdis, ne timigis, ĉar la aviadiloj ne tiel malalte flugis. En iuj lokoj tamen ili flugas tre malalte aŭ subite malaltiĝas, farante bruegon. Oni diras, ke la bruegoj estas „torturaj” kaj „korrompaj”. Ankaŭ bovinoj estis tiel teruritaj, ke ili produktis malpli da lakto, kaj eĉ rompis al si kruron pro freneza eksalto aŭ ekkuro. Cetere maljunuloj, aŭdante la bruon, ektimas, rememorante la militon.

La japana registaro kaj la usona armeo diras, ke tiuj aviadiloj observas la normon pri minimuma flug-alteco. La leĝo malpermesas flugi malpli alte ol 300 metrojn super homplenaj kvar-taloj kaj malpli alte ol 150 metrojn en



DARKPATOR

La bruegoj estas „torturaj” kaj „korrompaj”

aliaj lokoj. Tamen la leĝo origine celis aviadilojn kaj helikopterojn, kiuj flugas por fotado aŭ turismo. Ĝi ne celas ĉasaviadilojn. Ne ĝuste estas apliki la leĝon al aviadiloj tiaj.

Akcidento

Usonaj ĉasaviadiloj arbitre flugas en japana aero, ne publikiginte siajn kursojn. Male en Usono la armeo publikigas siajn kursojn kaj ne permesas malaltan flugadon super urboj aŭ eĉ bestoj. Tamen ne en Japanio. Se okazus akcidento, viktimiĝus multaj homoj, ĉar Japanio estas dense loĝata.

Japanio estas sendependa lando, ne usona kolonio. Japanoj ne estas devigataj pruntedoni sian teron por subteni usonajn militojn en Irako kaj Afganio. La japana registaro insistas, ke usonaj trupoj defendas Japanion. Tamen krom la registaro nur malmultaj japanoj tion kredas.

HORI Jasuo

Elektioj pli fruaj

Post la morto de la pola prezidanto Lech Kaczyński en aviadila katastrofo, en kiu pereis entute 96 homoj, inkluzive de politikaj kaj kulturaj altranguoj, sekvos monatoj da necer-teco.

La prezidantan rolon transprenis la ĉefmarŝalo de la parlamento, Bronisław Komorowski, jam prezidant-kandidato

de sia partio PO (Civitana Platformo) en balotoj origine okazigotaj en oktobro. Tamen pro la politika situacio la balotoj okazos pli frue.

Ĝemela frato

Ne eblas diri, kiu venkos. Krom Komorowski prezentos sin kandidato de la dekstra partio PIS (Juro kaj Justeco), al

kiu apartenis Lech Kaczyński. Nepras nun, ke PIS rapide trovu novan kandidaton. Verŝajne tiu estos la ĝemela frato de la pereinta prezidanto. Iama ministro de justico, Zbigniew Ziobro, ege konservativa, malpli verŝajnas kiel kandidato. La maldekstra flanko ne havas multajn ŝancojn. Ĝi malpli popularas kaj ĝia ĉefkandidato ĵus pereis. Aktuale la plej populara kandidato estas Komorowski, sed potenca restas PIS. Ĝi parolas pri la devo esti „patriota”, kvazaŭ nur dekstre-muloj estus tiaj. Cetere ĝi volas „plenumi la vojon kaj celojn” de la ĵus mortinta prezidanto.

Anna SKUDLARSKA

Malnova problemo pri maljunaj homoj

Franks Vandenbroucke [vandenbruke] kaŭzis etan tertremon en politikaj medioj en Belgio. Li estas politikisto en la flandra socialista partio SP. Li oficis, tre juna, kiel partiestro kaj kvin fojojn kiel ministro. Dum 25 jaroj li akiris grandan aŭtoritaton pro sia granda laborforto, dosierkono kaj honesteco, eĉ foje kontraŭ la gvidlinioj de la propra partio.

Tiel li jam konfliktis kun partiestroj en la propra partio kaj kun la valona socialista partio PS. Post la balotoj en 2009 li akiris multe da voĉoj, sed pro malkonsentoj kun la partiestro Caroline Genez [karolín ĝené], li ne plu estis proponata kiel ministro en la flandra registaro. Tio provokis internan krizon en lia partio, sed Vandenbroucke mem silentis.

Rentoj

Nun li reaperis en la komunikiloj pro prelego pri la estonteco de sociaj servoj en Belgio. Li kalkulis, ke, en la venontaj kvin jaroj, la belga federacia ŝtato devos ŝpari 18 miliardojn da eŭroj por povi vivteni nuntempajn sociajn avantaĝojn rilate pensiojn kaj sanprizorgadon. Kaj tio kondiĉe, ke la rentoj ne surprize altiĝu, ke ne falu la eŭro pro financaj problemoj en suda Eŭropo kaj ke la ekonomia kresko restu je 2 %. Tia ŝparo estus multe pli granda ol iam okazis en la postmilita periodo.

Aktivuloj

La kialo – rapida maljuniĝo de la loĝantaro – ne estas nova kaj ne aparte belga problemo. En 2040 triono de la popolo estos pli aĝa ol 65. Jam de jaroj avertas ekonomikistoj, ke tio necesigas



Frank Vandenbroucke [vandenbruke] kaŭzis etan tertremon en politikaj medioj en Belgio.

rimedojn. La nuna studaĵo estas tre konkreta. En najbaraj landoj oni jam enkondukis nepopularajn aranĝojn. Ĝuste en Belgio, kie la nombro de aktivuloj estas malalta kompare kun la najbaroj, oni prokrastas drastajn rimedojn pro manko de politika kohereco en la federacia registaro.

La studaĵo do ne provokis tion, kion oni povus esperi. Kaj PS kaj SP limigis sin al kritikoj pri detaloj de la dosiero kaj ŝajne preferas kaŝi la veran situacion. Pro timo perdi adeptojn, politikistoj – ne nur socialistoj – daŭre prokrastas la necesajn paŝojn, kiujn tiu maljuniĝo postulas. Sed pro tiu prokrasto la celpubliko de la socialistoj, la ekonomie malpli fortaj homgrupoj, estontece plej multe suferos.

Ivo DURWAELE

Sekretoj eltombigitaj

Dum la komunisma reĝimo en Albanio estis kondamnitaj al morto pro politikaj kialoj ĉirkaŭ 5600 viroj kaj pli ol 450 virinoj. Kontraste en Orienta Germanio, kun loĝantaro 15-oble pli granda, pereis samkiale nur 250 homoj.

Inter la ekzekutitoj estas eksaj partizanoj, oficiroj kaj altranguloj, inkluzive de membroj de la politburoo. La ŝtato disponis pri ok ekzekutejoj kaj tomb-ejoj, kiuj restis sekretaj. Tial la familianoj ne sciis, kie estas entombigitaj la viktimoj, almenaŭ ne ĝis 1991, kiam falis la reĝimo.

Malkovrita

Tiam, uzante informojn de eksaj policistoj, prokuroroj aŭ medicinistoj, parencoj komencis esplori la sorton de siaj familianoj. Tial estas malkovrita lastatempe amastombejo piede de la monto Dajt, tuj apud la albana ĉefurbo Tirano.

La registaro decidis starigi komisionon por trovi ĉiujn tombejojn kaj identigi la viktimojn. Krome, en la centro de Tirano, kie iam staris Stalin-monumento, oni konstruos rememorigilon pri la viktimoj de komunismo. Fine ekfunkcios nova instituto por studi la krimojn de komunismo.

Bardhyl SELIMI

Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net

JAPANIO

Reputacio revokita



DANIEL CTW

Nun japanoj esperas, ke Toyota, la plej granda kompanio en Japanio, kaj ties simbolo, rekiros la fidon de la mondo.

La japana aŭto-firmao *Toyota* estas unu el la grandaj aŭtomobilo-kompanioj de la mondo kaj konata pro la kvalito de siaj produktaĵoj. Tamen nun tutmonde kreskas kritikoj kontraŭ la kompanio. Ekde novembro pasintjare la firmao revokis milionojn da aŭtoj pro misfunkcio de la akcelilo aŭ de la bremsoj. La usona registaro taksis la nombron de revokitaj aŭtoj tre grava. En februaro pardonpetis Tojoda Akio, la *Toyota*-prezidanto, pro la akcidentoj kaŭzitaj de la misfunkcioj. Li promesis

plibonigi la procedojn de la kompanio kaj funde esplori la misfunkciojn.

Desegno

La problemoj devenas eble de laborplano lanĉita en 2003. Tiu ĉi t.n. globa ĉefplano antaŭvidis jare produkti pliajn 300 000 aŭtojn, ĝis entute en 2008 pli ol ok milionoj. Por tion realigi *Toyota* aplikis diversajn rimedojn. Ekzemple en 1995 *Toyota* bezonis 18,8 monatojn ekde la desegno ĝis la vendo; en 2006 nur 12 monatojn.

Anstataŭ kontroli la kvaliton per prov-aŭto, la firmao dependis de komputiloj. Samtempe ĝi konstruis novajn fabrikojn en Usono kaj en Azio. La firmao rapide kreskis sed, kiel agnoskis la prezidanto, mankis homfortoj.

Intertempe grandiĝis la nombro de revokitaj aŭtoj. Ekde la fino de la pasinta jaro tiu ĉi nombro atingis pli ol 10 milionojn. Nun japanoj esperas, ke *Toyota*, la plej granda kompanio en Japanio, kaj ties simbolo, rekiros la fidon de la mondo.

HORI Jasuo

JAPANIO

Fluginte bankroten

Bankrotis Japana Aerlinio (JAL), longe la simbolo de Japanio. En 1951 fondiĝis JAL kiel jura persono subvenciata de la ŝtato. Tamen en februaro 2010 ĝi petis la registaron apliki la leĝon por reorganizi bankrotintajn kompaniojn.

Laŭ la leĝo speciala kompanio entreprenos diversajn rimedojn por restarigi JAL-on. Tiuj eble inkluzivos: vendi ĉiujn 37 tiel nomatajn mamutajn jetojn por malpliigi benzino-kostojn; nuligi 14 internaciajn kaj 17 enlandajn senprofitajn flugliniojn; maldungi trionon de la laboristaro; retiriĝi el hoteloj kaj turismo;

tranĉi emerito-pensiojn; kaj kunlabori kun la usona flugkompanio *Delta*. Tiel oni celas profitigi JAL-on en 2011.

Laŭ la japana gazetaro, JAL bankrotis pro diversaj kialoj. En la ŝtata kompanio tro intervenis politikistoj kaj ministroj. Simile, la registaro de la Liberala Demokratia Partio konstruigadis flughavenojn kaj trudis al la flugkompanioj servojn, kiuj ne donis profitojn.

Atakoj

Kulpis ankaŭ la teroristaj atakoj en Usono en 2001, kiuj frapis JAL-on, ĉar japanoj ne emis vojaĝi eksterlanden.

Krome, en 2005, okazis akcidentoj al JAL, kiuj damaĝis la reputacion de la kompanio. Fine, inter la estraranoj de JAL estiĝis konfliktoj.

Notindas, ke aliaj ŝanĝoj pli kaj pli malhelpas al flugkompanioj. En Japanio oni konstruas reton de rapidtrajn-linioj, ankaŭ ŝoseojn. Eblas veturi ankaŭ per malmultekostaj busservoj.

La nova registaro de la Demokratia Partio ŝanĝos la iaman politikon pri aviado. La partio sloganas: „De betono al homoj.” Tio signifas, ke baldaŭ malaperos kelkaj flughavenoj.

HORI Jasuo

Libereco – festinda eĉ post 20 jaroj

En marto la litovoj festis la 20-jariĝon de la sendependeco disde Sovetio. Ili memoris, kiel antaŭ 20 jaroj Vytautas Landsbergis, la novelektita estro de la tiama supera konsilio de Litovio, televide anoncis: „Litovio estas libera. Kaj en la animo, kaj en la juro. Ni povus krei: ankaŭ Latvio estos libera! Estonio estos libera kaj ankaŭ ĉiuj aliaj, kiuj nun ne estas liberaj.”

Festante la datrevenon, Litovio fariĝis dum unu tago kvazaŭ centro de politikaj eventoj en Eŭropo. Vizitis prezidantoj de aliaj eŭropaj ŝtatoj, inkluzive de la estona Toomas Hendrik kaj la latva Valdis Zatlers, kaj aliaj gravaj politikistoj. Okazis paradoj, koncertoj kaj eĉ diskutoj pri la 20 jaroj da sendependeco.

Respekto

La litova prezidanto, Dalia Grybauskaitė, diris, ke al sendependeco kondukis miljara historio. „Hodiaŭ ni ne perdu la celon, kiu kunigu nin jam en libera Litovio: anima bonstato, reciproka respekto kaj unueco antaŭ malfacilaĵoj”, ŝi aldonis.

La dato de la sendependiĝo – la 11-a de marto – ne estis hazarda. Laŭ la konstitucio de la tiama Sovetio eblis forlasi la union, tamen ne estis priskribite kiel. Moskvo jam intencis apliki la konstitucion por malhelpi la ekŝiĝon de Litovio. Iom poste, en januaro 1991, sovetiaj armeoj celis efektiviĝi ŝtatrenverson kaj okupis radio- kaj televido-staciojn. Pereis 14 personoj. La sovetia armeo forlasis Litovion definitive en aŭgusto 1993.

Krome, post la sendependiĝo, neniu

volis agnoski la novan ŝtaton. Islando fariĝis la unua. Usono sekvis en 1991, fariĝante la 37a. Hodiaŭ Litovion agnoskas 154 ŝtatoj de la mondo.

LAST



Kunfestis 20-jarojn da sendependeco tri baltaj prezidantoj: de Estonio, Toomas Hendrik; Litovio, Dalia Grybauskaitė kaj Latvio, Valdis Zatlers.



BELGIO

Eksterlanda politiko: ĉu etika aŭ pragmata?



Pieter De Crem [piter de krem] proponis, ke kongaj soldatoj defilu dum la belga nacia festotago en Bruselo.

Belgio ankoraŭ konservas fortajn ligojn kun sia ekskolonio Kongo. Granda parto de la belga evoluhelpo fluis al tiu lando. Sed la rilatoj ofte fluktuis pro belga malaprobo pri misistacioj en Kongo.

En politikaj medioj plurfoje okazis diskutoj, ĉu nepre subteni la instancojn por ne fuŝi la belgajn kulturajn, politikajn kaj komercajn rilatojn, ĉu postuli, ke oficiala helpo al Kongo servu al la popolo anstataŭ al pliriĉiĝo de korupta kasto.

La ebla influo de Belgio tamen nuntempe multe ŝrumpis, ĉar ekzemple Ĉinio pretas proponi sumojn por subteni la ekonomian disvolviĝon, kiuj multe superas la belgajn eblojn. Belgio antaŭvidas helpon de 195 milionoj en la venontaj tri jaroj; Ĉinio promesis 9 miliardojn.

Profitemo

Tamen Karel De Gucht [hiĥt], kiam ministro pri eksterlandaj aferoj kaj poste kiam komisionano de Eŭropa Unio, kuraĝis publike denunci la profitejon de politikistoj el la registaro de Kabila. Kongo tiom indigniĝis, ke ĝi deklaris

De Gucht ne plu bonvena en la lando.

Lia posteulo kiel ministro pri eksterlandaj aferoj en Belgio, Steven Vanackere [stéven vanákere], penadis restarigi amikajn rilatojn. Parte pro tio la belga reĝo Alberto 2a, kun reprezentantoj de la registaro, ĉeestis festojn pro la 50-jara sendependiĝo de Kongo.

Streboj

Leviĝis la demando, ĉu la reĝo ne devus viziti specifajn tieajn organizaĵojn por montri, ke li subtenas la strebojn al plidemokratiigo de la lando. Sed supozeble nenio okazos sen la beno de Kabila kaj liaj ĉirkaŭuloj.

Prepare al la reĝa partoprenado en la festoj, belgaj delegacioj jam vizitis kaj vizitos la landon. Kiam Pieter De Crem [piter de krem], ministro pri milita defendado, tie proponis, ke kongaj soldatoj defilu dum la belga nacia festotago en Bruselo, precipe la flandra gazetaro indigniĝis.

Armeo

Novaĵoj pri la propono atingis Belgion tuj antaŭ UN-raporto, kiu menciis, ke armeo, polico kaj informservoj en Kongo sisteme kaj arbitre arestas, torturas, mortigas kaj seksperfortas civitanojn kaj ankaŭ dungas infansoldatojn. La situacio en Kongo, laŭ la raporto, multe pligraviĝis en 2009.

Kaj, kvankam la ministro estas flandra, denove la komunumoj diverse reagis. Flandraj politikaj partioj malaprobis la paŝon de la ministro, escepte de la partio, al kiu apartenas De Crem, kiu ne esprimis starpunkton. Valonaj registaraj



Karel De Gucht [hiĥt], kuraĝis publike denunci la profitejon de politikistoj el la registaro de Kabila.

partioj ne kontraŭis lian proponon. Tamen la invito ne oficialiĝis.

Ivo DURWAELE

BURUNDO

Kuraĝiga kandidato

Por la unua fojo en la historio de Burundo, kandidatiĝis virino por la posteno de prezidanto. Pascaline Kampayano, kiu reprezentas la opozician partion UPD (Unio por Progreso kaj Demokratio), estas la sola virino el naŭ anoncitaj kandidatoj. Ŝia nomumo estas strategia, ĉar en Burundo virinoj konsistigas pli ol 55 % de la loĝantaro kaj oni kuraĝigas virinojn kaj voĉdoni kaj voĉricevi.

Jérémie SABIYUMVA

Energie lernante

Apartan publikan atenton akiris jar-komence du altrangaj germanaj politikistoj pro sia aparta rilato al la angla lingvo. Unue Guido Westerwelle, la nova federacia ministro pri eksterlandaj aferoj, rifuzis respondi al angla raportisto en la angla lingvo dum demandohoro („gazetara konferenco”) de la registaro.

Li ne nur ne respondis en la angla, kiel kutimis fari liaj antaŭuloj (cetere nur en la angla, ĉar pri aliaj lingvoj ili ne disponis), sed li eĉ ne allasis demandojn en alia lingvo ol la nacia. „Ni tie ĉi estas en Germanio, kaj kiu raportas pri ĝi, esploru en la landa lingvo”, li diris.

Fenomeno

Jen novaj tonoj en postmilita Germanio, ĉiam pli kutimiĝanta al la lingvo de la venkintoj kvazaŭ natura fenomeno. Al atenta observanto, tamen, tia konduto estas konata. Jam antaŭ jaroj Popola

Respubliko Ĉinio decidis, en samaj cirkonstancoj, postuli la landan lingvon.

Similan konatecon atingis Günther Oettinger, iama ministroprezidanto de la germana federacia lando Badeno-Virtembergo, pro parolado antaŭ la Eŭropa Parlamento en Bruselo. Ne pro ties enhavo li famiĝis, sed pro lia mallerta traktado de la angla lingvo.

Ĵargono

Lia regiona dialekto kaj lia speciala lingvouzo formis el la angla tre apartan ĵargonon. Tamen la parlamento iel komprenis kaj akceptis lin kiel EU-komisionanon pri energio. Tian rudimentan lingvaĵon verŝajne multaj tie uzadas, sed ne nepre publike.

Cetere, la konduto de Westerwelle tute ne trovis ĝeneralan akcepton inter la landanaro. Oni mallaŭdis „novan germanan naciismon” kaj rifuzon de laŭdira „lingva internacieco”, lige kun la

suspekto, ke la ministro pri eksterlandaj aferoj ne bone konas „la internacian lingvon”.

Oettinger, kontraste, kiu ja mem evidentigis sian staton en la angla, renkontis fortan primokadon kaj saman akuzon pri nekompleta kompetenteco en la deĵorado. La nova komisionano pri energio tamen ne meritas kompaton. Kiel ministroprezidanto de Badeno-Virtembergo, federacia lando apud la franca landlimo, li iam rifuzis enkonduki la najbaran francan lingvon en bazajn lernejojn. Anstataŭe li tiam trudis la „anglan mondlingvon”. Evidente li ne bone lernis la propran lecionon.

Traktadoj

Intertempe la EU-komisionano tamen montriĝas lernokapabla. La nova posteno kaj la publika atento direktos almenaŭ parton de lia energio en lingvistudadon. Intervjuate, li diris, ke en bruselaj paŭzoj li volas studi la anglan lingvon. Eĉ nun li taksas sian nunan anglan sufiĉa por la ĉiutago. Tamen eŭropaj burĝoj certe trankviliĝos, ke Oettinger en gravaj internaciaj traktadoj intencas uzi tradukiston, ĉar li „ne planas konfirmi kontraktojn pri miliardoj per la angla”.

En Germanio nun estas tri lingvaj tavoloj. Unu, la lerta ekonomia kaj politika kasto, edukiĝis kun nur unu komunika lingvo, la angla, kaj primokas ĉiun, kiu ne povas atingi ilian lingvonivelon kaj vivomanieron. Dua klopodas respekti la diversajn kulturojn kaj komuniki en multaj lingvoj aŭ uzi neŭtralan internacian lingvon. Tria ne multe klopodas pri lingvoj aŭ malsukcesas en la lernado. Aparte tiaj homoj admiras kaj favoras anglemulojn.

Franz-Georg RÖSSLER



Günther Oettinger, iama ministroprezidanto de la germana federacia lando Badeno-Virtembergo, famiĝis pro lia mallerta traktado de la angla lingvo.

Migrado multmilionna

Ne pro Valenteno-tago hastis ĉinoj antaŭ la 14a de februaro al siaj hejmlukoj, sed pro la tradicia printempa festo. La festo varias ĉiujare inter la lasta tagdeko de januaro kaj la dua tagdeko de februaro kaj okazas la unuan tagon de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Sep tagojn ĉinoj festas.

Familia rekuniĝo estas delonga sopiro por ĉinoj. Ĉe la sojlo de la ĉina novaĵaro la hejmluko altiras kvazaŭ magneto homojn de longe for. Kia forto kuŝas en tio? Kulturo. Kortuŝe estas spekti en la televido la movadon de pasaĝeroj en flughavenoj kaj fervojaj stacidomoj antaŭ la festo.

La festo estas tiel nomata pro tio, ke ĝi falas ĉirkaŭ la komenco de printempo, la unua sezono de la jaro, kiam revigliĝas diversaj vivaĵoj en la naturo. En la ĉina kulturo la Printempa Festo estas markata per kuna vespermanĝo de generacioj; per petardo-eksplozado, kiu, oni kredas, forigas perversaĵojn; per novaĵara deziro al aliaj, kiu signas harmonion; kaj per pendigo de versduoj sur muron aŭ ambaŭflanke de la pordo, kiuj esprimas benon. Sen tiuj aktivaĵoj, ĉinoj senkonscie perdus longdaŭran kulturon.

Grandskala

La dumfesta migrado, plej grandskala en la homa historio, okazas ĉiujare dum ĉirkaŭ 40 tagoj. Ĉi-jare ĝi komenciĝis la 30an de januaro. Aviadiloj, trajnoj, aŭtobusoj kaj ŝipoj alfrontas grandan premon. La fervoja ministerio de Ĉinio prognozis, ke ĉirkaŭ la printempa festo la fervoja transporto 210 milionojn da ĉinoj, do tage 5,25 milionoj da homoj. De la 6a ĝis la 12a de februaro ĉiutage 180 000 pasaĝeroj envagونيĝis ĉe la ok-

cidenta fervoj-stacio de Pekino, kaj en la kulmino 310 000 pasaĝeroj.

Imageble, ke biletoj estas malfacile akireblaj. Kvankam oni povas aĉeti fervoj-biletojn en stacidomoj aŭ ties agentejoj, aŭ telefone, tekstmesaĝe aŭ interrete mendi, sidlokoj estas apenaŭ certigitaj. Oni devas atendi multajn horojn ekde frumatene antaŭ la ekvendo de biletoj. En Pekino tri fervoj-stacioj tage kaj nokte servas per 410 bilet-giĉetoj, inkluzive de tiuj speciale por elkamparaj laboristoj kaj studentoj. Dum tiuj tagoj veturas 91 ekstraj trajnoj.

Farĉitaj

Tamen vojaĝi signifas foje suferi. La 25an de januaro la trajno inter Shenzhen kaj Xinyang haltis nur kvar minutojn ĉe

la stacio de Dongguan, kie pli ol 1500 pasaĝeroj atendis. Konduktoroj helpis al la pasaĝeroj grimpi tra fenestroj en la vagonaron. Tiu sceno estas fotita kaj dissendita surrete. Retpaĝaro Dayang diris, ke en la trajno de Guangzhou (Kantono) al Xinyang ĉiuj sidlokoj estas okupitaj, kaj homoj estas farĉitaj en koridoroj, vagon-konektejoj, necesejoj, eĉ sur dorsapogiloj de seĝoj.

En la provinco Guangdong 130 000 elkamparaj laboristoj motocikle revenis al siaj hejmlukoj en la provincoj Guangxi, Guizhou, Hunan kaj Sichuan por ŝpari la monon. Kunportante kaskon kaj pluvmantelon ili unuope aŭ skipe veturis. La loka registaro sendis 20 000 policianojn por direkti la trafikon kaj starigis ripozejojn sur la vojo por la vojaĝantoj.



La okcidenta fervoj-stacidomo en Pekino, el kiu centmiloj da ĉinoj forveturas por festi familie la novan jaron.

Spekulado

Antaŭ kaj post la printempa festo de la jaro 1993 oni periode prezaltigis la fervoj-biletojn por mildigi la trafik-premon en iuj lokoj. Tamen tio ne povis redukti la kvanton de la pasaĝeroj. Ekde 2008 la fervoj-biletoj ne plu prezaltigās dum la festo. Estas ellaborita nova regularo por limigi pogranda bilet-aĉetadon por bremsi bilet-spekuladon. Tiamaniere oni aĉetu bileton per identigilo aŭ per aliaj pli ol 20 atestiloj, simile kiel flug-biletojn.

Ŝajnas, ke la regularo ne sukcesas. En retpaĝaroj multaj kritikis ĝin. Opiniis iu retumanto: „La regularo ne povas altigi la trafik-kapablon, male ĝi kaŭzas pli da obstrukcoj, ĉar la teknologio por falsi atestilojn estas pli matura ol tiu por presi fervoj-biletojn.”

Infrastrukturo

Krom dumtempaj rimedoj Ĉinio faras grandan investon por infrastrukturo. En la lastaj kvar jaroj oni konstruis altrapidan fervojon, longan je pli ol mil kilometroj. Laŭ la ĉina ministerio pri

fervojoj en la jaro 2012 altrapidaj fervojoj kondukos al regionoj kun 95 % de la tuta loĝantaro. Tiam la veturtempo multe mallongiĝos. Ekzemple la vojaĝo inter du grandaj urboj Wuhan kaj Kantono, distancaj minimume 1068 kilometrojn inter si, postulos eĉ malpli ol tri horojn, je ok horoj malpli ol nun. La vojaĝo inter Pekino kaj Honkongo, jam ne tutan tagnokton, sed nur trionan.

La ĉefa kaŭzo de la grandskala migrado kuŝas en tio, ke la ekonomia disvolviĝo estas malekvilibra inter diversaj regionoj de Ĉinio. Multaj superfluaj laborfortoj invadas de vilaĝoj al urboj, de malgrandaj urboj al metropoloj. Kompare kun la orienta ĉemara regiono, la aliaj restas relative malriĉaj.

Stagnaj

En la komenco de la politiko „reformado kaj pordomalfermo”, orientaj ĉemaraĵoj, ekzemple Shenzhen, Kantono, Ŝanhajo kaj Dalian, estis la unuaj komerce kontakti aliajn landojn. La ekonomio en tiuj urboj rapide kreskis. Sed aliaj lokoj, precipe la okcidentaj

provincoj, t.e. Sichuan, Yunnan, Tibeto kaj Qinghai, restis stagnaj. Tial homoj, precipe tiuj subedukitaj, el la malriĉaj regionoj, volas kaj nur povas fari fizikan laboron en orientaj urboj.

Iuj migrintoj timas reveni al siaj hejmlukoj. La ĵurnalo *Ĉina Junularo* faris retan enketon, kiun partoprenis 1840 homoj. Opiniis 69,4 %, ke ili timas „perdi vizaĝon” (humiliĝon), ĉar ili ne povis gajni sufiĉe da mono por paradi antaŭ siaj parencoj kaj amikoj. Aliaj timas trafik-premon, geedziĝon altrudotan de iliaj gepatroj, atendojn pri novjara mondonaco al infanoj kaj luksaj bankedoj.

La grandskala migrado estas unika fenomeno de Ĉinio. Espereble, post kiam efektiviĝos politikoj favoraj al kamparanoj, ekzemple forigo de agrikulturaj impostoj, subvenciado al kamparanoj por aĉeti hejmajn elektrajn aparatojn, financa subtenado de koton-kultivado, sojfaboj kaj aliaj agrikulturaj plantoj, kamparanoj povos riĉiĝi en la hejmluko anstataŭ pene perlabori en urboj.

Alice Liu



Nepras longe atendi por aĉeti biletojn, kiuj ne garantias en la trajnoj sidlokojn.

AŬSTRIO

Mordaj demandoj

Jam de jardekoj regas la aŭstran ĉefurbon Vieno la socialdemokratoj, nun eĉ per absoluta plimulto. Tamen, por montri demokratiemon, la socialdemokratoj organizis pridemandadon de la popolo en februaro 2010. La kostoj estis 7 000 000 eŭroj. Jen la rezulto:

1) Ĉu ree deĵoru novtipa prizorganto por multloĝejoj domoj? 84 % jes.

2) Ĉu estu eblo viziti tuttagan lernejon (8a ĝis 16a horo) por ĉiu lerneĵano? 77 % jes.

3) Ĉu oni pagu imposton por aŭtoveturado en la centraj distriktoj de Vieno? 77 % ne.

4) Ĉu semajnfine la metroo en Vieno funkciiĝu tutnokte (kvankam ekzistas noktaj buslinioj)? 55 % jes.

5) Ĉu posedantoj de tiel nomataj batalhundoj havu specialan permesilon? 89 % jes.

Partoprenis la pridemandadon 411 075 personoj aŭ 35 % de la loĝantaro. Temis pri la due plej bona rezulto.

La opozicio kritikis la proponitajn kromtekstojn, ĉefe por la dua demando: „Internaciaj esploroj pruvas, ke tuttaga lernejo estas ĉefa kondiĉo, se gepatroj volas profesie labori kaj samtempe havi infanojn.”

Rilate la kvinan demandon: ĉu hundo mordemas, dependas unue de la edukado de la hundo kaj de la posedanto kaj due de la raso de la hundo. Kelkaj rasoj



Tiu ĉi ŝafhundo tre ludemis en sia junaĝo kaj neniam mordis.

pli mordemas, ekzemple rotvejla hundo, terhundo, mastifo kaj dogo. Eble ankaŭ ŝafhundo aperos en la listo.

Fojfoje infanojn kaj maljunajn personojn grave vundas hundo. Gvidpermesilon jam havas 3000 hundoposedantoj en Vieno.

Walter KLAG

HOMAJ RAJTOJ

Ĉi tiun lingvon vi ne uzu!

Trairas usonajn kortumojn juĝafero pri lingvaj rajtoj. Maldungita estas bazlerneja sekretariino dulingva, ĉar ŝi helpis interpreti inter la hispana kaj la angla – tasko, por kiu ŝi estis enpostenigita en 2006.

Kiam eniris la lernejon, en Devonshire, Norda Karolino, hispanlingva patrino por raportoj eblan seksperton kontraŭ sia seĝaraĝa filo, la sekretariino Ana Ligia Mateo interpretis por registri la koncernajn informojn.

Tio tamen ne plaĉis al la nova lernejestrino, Suzanna Gimenez. Tiu en 2008 ŝanĝis la lernejan politikon, tiel ke oni rajtas paroli nur la anglan, eĉ se gepatroj

kaj aliaj nur malbone regas la lingvon. Fakte, 42 % de la infanoj devenas de hispanlingvaj familioj. Malgraŭ tio, la lernejestrino avertis la sekretariinon, ke ŝi ne plu uzu la hispanan.

Diverseco

Rezulte, post kiam la sekretariino helpis la plorantan patrino, la lernejestrino ŝin maldungis. Ironie, la lerneja retejo montras devizon pri „kultura diverseco”. Pro la elpostenigo, la usona komisiono pri egalaj rajtoj konsilis la sekretariinon kaj taksis, ke la lernejo lezis ŝiajn civilajn rajtojn. En septembro 2009 Mateo ekprocesis kontraŭ la lernejo pro

diskriminacio.

Argumentis Mateo, ke antaŭ la lingva disputo ŝi bone plenumis sian laboron, ricevinte laŭdojn kaj plialtigon de la salajro. Tamen poste oni akuzis ŝin komploti kun hispanlingvaj gepatroj kontraŭ la nova lernejestrino. Fariĝis pli kaj pli streĉa la situacio, ĝis venis la ploranta patrino.

Peto

La lernejestrino rifuzis la peton de Mateo, ke ŝi interpretu, kaj insistis, ke la eble perfortita seĝarulo mem interpretu. La patrino tamen ne komprenis, kaj fine forlasis la lernejon, ne atinginte la celojn de sia vizito.

Maldungite, Mateo suferis pro nerva streĉiteco kaj perdis salajron kaj asekuron kun valoro de pli ol 10 000 dolaroj. Intertempe la jurkazo migris de nord-karolina al federacia kortumo, kie ĝi estas ankoraŭ pritraktata.

Russ WILLIAMS

Knoppix

Du malbonaj aferoj okazis al nia familio ĉi-jare en la tago de sankta Valteno. Unu estas, ke mia trijara filino perdis sian pluŝkuniklon, Mifi, kiu estis ŝia konstanta kunulo dum pli ol du jaroj. La alia estas, ke la disko de mia tekokomputilo mortis – eble pro interesa misagordo, pri kiu mi tamen ne skribos hodiaŭ. Verŝajne mi normale pli ĉagreniĝus pro la mortinta disko, sed kiam la eta knabino malgaje diras, ke ŝi volas sian etan ruĝan Mifi, jam komprenante, ke ŝi ne povas havi ĝin, oni tiom kompatas ŝin, ke la perdo de kelkaj komputilaj dosieroj ŝajnas tre malgrava afero.

Pro la mortinta disko mi havis okazon provi *Knoppix* denove. *Knoppix* [knopiks] estas mastruma sistemo, bazita sur *Debian GNU/Linux* (*Linukso*), kiu funkcias rekte de KD aŭ DVD, tiel ke ĝi tute ne bezonas la ĉefan diskon. Tio povas utili en pluraj manieroj. Ekzemple, oni povas uzi *Knoppix* por kontroli, ĉu la komputilo, aŭ iu parto de ĝi, bone funkcias kun *Linukso*. Aŭ se oni volas mem provi *Linukson*, sen tuŝi la jam instalitan mastruman sistemon, *Knoppix* proponas solvon. Alia situacio, en kiu *Knoppix* utilas, estas, se oni volas kontakti sian bankon aŭ fari ion alian, kio postulas gravan pasvorton, per komputilo, kiu eble estas infektita per virusoj: se oni ne uzas la diskon, ne vere gravas, kiuj virusoj tie embuskas. Por mi, en la nuna situacio, *Knoppix* utilas, ĉar ĝi ebligas al mi uzi la komputilon, kiu alie eĉ ne povus starti. Mi uzis la kvazaŭrompitan komputilon por mendi novan diskon, kaj mi nun uzas ĝin, malgraŭ la mortinta disko, por skribi ĉi tiun artikolon.

Kompreneble, se oni ne uzas la diskon, oni devas trovi alian manieron konservi sian laboron. Oni povas uzi



Se vi volas vidi, kiel la fenestroj eksplodas, kiam oni fermas ilin, vi devas mem provi Knoppix ... sed por tio vi ne devas instali ĝin!

USB-memorilon, sed mi skribas ĉi tion per docs.google.com, ĉar mi havas relative fidindan retkonekton per la sendrata reto, al kiu *Knoppix* tute senprobleme konektiĝis, petinte nur la pasvorton. Fakte ĉio, kion mi provis, bone funkciis, krom unu graveta afero: mi ne trovis manieron reagordi la klavaron por uzi britan aranĝon anstataŭ la implicita usona. Eble tio estas cimo en la versio, kiun mi elŝutis, kiu havas la daton 2010-01-31.

Knoppix estas la verko de germano, Klaus Knopper, kaj li disponigas du variantojn de ĉiu eldono: anglalingvan kaj germanlingvan. Laŭ mia kompreno, la diferenco estas nur la implicitaj lingvo kaj agordoj, kiam ĝi startas; eblas ŝanĝi la lingvon poste, kondiĉe ke oni sufiĉe komprenas la komencan lingvon por trovi la koncernan agordilon. Se vi ankoraŭ ne konas *Linukson*, sed interesiĝas pri ĝi, mi rekomendas, ke vi provu *Knoppix*, ĉar ne estas granda laboro: oni devas nur elŝuti grandan iso-dosieron, skribi ĝin kiel diskobildon sur KD-on (aŭ DVD-on, se vi volas pli kompletan version) kaj restartigi la komputilon per tiu KD: ofte sufiĉas havi ĝin en la KD-legilo, kiam la komputilo startas, sed eble vi devus ŝanĝi la BIOS-agordojn, por ke ĝi startu de la KD kaj ne de la ĉefa disko.

Se vi tion faros, indas memori, ke

Knoppix estas nur iu versio de *Linukso*. Ekzistas multaj versioj, tiel nomataj „distribuoj”, kaj kvankam ili baziĝas sur la sama kerno, ili povas supraj aspekti tre diverse. La versioj de *Linukso*, kiujn mi kutime uzas, hejme kaj oficeje, ne havas la amuzajn eksplodantajn fenestrojn kaj aliajn pireteknikaĵojn, kiuj estas parto de ĉi tiu versio de *Knoppix*. Verŝajne oni povas malsalti ilin, sed ili ne sufiĉe ĝenas min por instigi min investi tempon por trovi la koncernan agordilon. Kiam mi ricevos novan diskon, verŝajne mi reinstalos la version de *Linukso*, al kiu mi plej kutimas, ĉar estas malagrade esti devigita adapti sin en mia aĝo, kaj ankaŭ en multe pli juna aĝo. Aliflanke, kelkfoje rompo de rutino estas bona, kvankam mia filino verŝajne ne konsentus pri tio. Tial, se vi hazarde renkontos etan ruĝan Mifi, proksimume 16 cm altan de la piedoj ĝis la blankaj orelopintoj, per kiuj ŝi tiel ofte tenis ĝin, mia filino tre ĝojus rehavi ĝin.

Postskribo. Miraklo okazis! Tri semajnojn post la malapero Mifi revenis. Iu reportis ĝin, responde al la afiŝo, kiun ni metis ĉe la ludejo, kie ĝi perdiĝis. Rosa tre ĝojis, sed ne sufiĉe miris, laŭ mi. Iam ŝi devos lerni, ke perditaj aferoj ne ĉiam revenas tiel ...

Edmund GRIMLEY EVANS

Parto 2:

Kiun poŝlegilon mi akiru?

La merkato de elektronikaj libroj fulme grandiĝas, sed oni ne povas legi ilin sen aparato. La elekto estas tre granda, kaj la gamo estas dividebla en tri grandajn grupojn: poŝlegiloj, kiuj konvenas nur aŭ ĉefe por legi librojn (ekzemple *Sony Reader*); poŝkomputiloj kaj lertaj poŝtelefonoj, kiuj taŭgas ne nur por legi librojn, sed ankaŭ por telefoni, retumi kaj multe pli (ekzemple *iPhone*); kaj ordinaraĵ teko- aŭ tablo-komputiloj.

Ordinaraĵ komputiloj

La uzo de ordinara komputilo, vinda, linuksa, makintoŝa ..., ne estas la plej trafa elekto. Libron oni ja volas legi sidante ne ĉe sia skribotablo, sed komforte en seĝo, en trajno, en sia bankuvo eĉ. Tamen la plimulto de la legantoj de tiu ĉi rubriko supozeble posedas komputilon kaj eble volos provi siajn unuajn elektronikajn romanojn tie.

Por legi librojn en la formo **PDF** plej ofte ne necesas instalii ion. La plimulto de la uzantoj de Vindozo verŝajne iam instalii *Adobe*-legilon. Uzantoj de Makintoŝo eĉ ne devas instalii ion; alklaki la PDF-libron sufiĉas. Kaj linuksuloj verŝajne jam posedas *Foxit*, *Evince* aŭ alian PDF-legilon.

Por legi verkojn en la formo **ePub** rekomendinde estas uzi la TTT-legilon *Mozilla Firefox* kaj aldoni la senpagan kromprogramon *EPUBReader*. Ĝi funkcias sub la tri grandaj mastrumaj sistemoj: Vindozo, Mak kaj Linukso. Se vi uzas la esperantlingvan fasadon de *Firefox*, ankaŭ *EPUBReader* parolos Esperanton al vi. Alternativoj estas *Bookworm* (Librovermo) kaj *Ibis Reader* (Ibiso-legilo), kiuj ambaŭ estas enretaj legiloj. Vi trovos ilin respektive ĉe

bookworm.oreilly.com kaj *ibisreader.com*. Viajn ePub-librojn vi alŝutas al ilia servilo, kaj vi povas iam ajn (se vi havas retkonekton) legi ilin.

La tria populara libroformo estas **Mobipocket**. Vindozuloj povas akiri legilon de *www.mobipocket.com*, sed linuksuloj kaj makuloj devos rezigni pri legado de libroj en la formo MOBI. Por ili ankoraŭ ne ekzistas legilo.

Lertaj poŝtelefonoj

Lertaj poŝtelefonoj kutime ne estas tre lertaj pri PDF-libroj. Ekzistas *Adobe*-legilo por aparatoj kun la sistemoj *Palm* kaj *Pocket PC*, kaj la supre menciita *Foxit*-legilo taŭgas por *Windows CE 4.2* kaj *5.0*. Por poŝtelefonoj pli konvenas libroj de la formo *Mobipocket*, kiun oni povas legi en aparatoj kun la mastruma sistemo *Palm*, *Symbian*, *Windows Mobile* kaj en *Blackberry*-aparatoj. Posedantoj de *iPhone*-telefono prefere mendu librojn en la formo ePub. Ili povas akiri en la butikoj de *Apple* la senpagan programon *Stanza*, kiu perfekte taŭgas por administri sian ePub-kolekton, aŭ ili povas uzi la – same senpagan – programeton *Ibis Reader*, kiu tamen havas malpli da ebloj, ol *Stanza*.



Ĉapitro el la libro Kvazaŭ ĉio dependus de mi en la poŝlegilo de Sony.

Poŝlegiloj

Laste, sed certe ne balaste, venas la veraj poŝlegiloj. La plimulto el ili havas la avantaĝon, ke ili uzas tiel nomatan elektronikan inkon. La ekrano aspektas vere kiel papero kaj ne lumas, kiel poŝkomputiloj kaj poŝtelefonoj. Oni eĉ en plena sunlumo povas legi ilin. Malavantaĝo estas, ke ili havas nigra-blankan ekranon. Libro kun koloraj fotoj estos malpli alloga en tiaj legiloj.

La ĉefa malavantaĝo estas tamen, ke la plimulto de la poŝlegiloj malbone taŭgas por Esperanto. Ili enkorpiĝas nur tre malgrandan unikodan tiparon, en kiu mankas la tipaj Esperanto-literoj (sed ne nur la esperantaj, ankaŭ ekzemple grekaj, polaj, rumanaj kaj latvaj). Eldonistoj de elektronikaj Esperanto-libroj grandparte solvis tiun problemon, liverante ePub-librojn kun enkorpiĝitaj unikodaj tiparoj. Sekve la libroj mem estas bone legeblaj, sed la enhavtabeloj, kiuj uzas la limigitajn tiparojn de la legilo mem, montros strangaĵojn kiel „Kvaza? ?io dependus de mi?”. Do se vi ne volas havi problemojn kaj ne volas mem fari ŝanĝojn al via legilo, provizore rezignu pri poŝlegilo kaj uzu lertan poŝtelefonon aŭ komputilon.

La gamo de poŝlegiloj estas tre vasta, kaj tiu ĉi artikolo povas menci nur kelkajn. Tre popularaj estas la legiloj de la firmao *Sony*. Notinde estas, ke ili kapablas legi librojn en la formoj PDF

Lingvoj

Esperanto: "Laŭ Ludoviko Zamenhof bongustas freŝa ĉefa manĝaĵo kun spicoj."

La Angla: "The quick brown fox jumps over the lazy dog."

La Rusa: "Съешь ещё этих же мяных французских булок, да выпей чаю."

La Germana: "Falsches Üben von Xylophonmusik quält jeden größeren Zwerg."

La Franca: "Le cœur déçu mais l'âme plutôt naïve, Louys rêva de crapaüter en canoë au delà des îles, près du mälström où brûlent les novae."

La Hispana: "El pingüino Wenceslao hizo kilómetros bajo exhaustiva lluvia y frío, añoraba a su querido cachorro."

La Pola: "Pchnąc w tę łódź jeża lub ośm skrzyń fig."

La Nederlanda: "We zaten met zijn drieën

La poŝlegiloj de Pocketbook bone montras Esperanton kaj multajn aliajn lingvojn.

kaj ePub, sed ne Mobipocket-librojn, kaj ke ili fuŝe montros la enhavtabelojn, se enestas libroj en Esperanto aŭ en lingvoj, kiuj uzas specialajn diakritojn, kiel la pola, aŭ tute aliajn literojn, kiel la greka aŭ tamila.

Pli kaj pli populariĝantaj estas la poŝlegiloj de la nederlanda firmao *Endless Ideas BV*. Ĝi vendas ilin sub la nomo *BeBook*, sed en iuj landoj ankaŭ sub aliaj markoj. Ankaŭ tiuj ĉi legiloj uzas elektronikan inkon, same kiel la *Sony*-legiloj. Kontraste al *Sony* tiu ĉi kapablas legi 23 specojn de e-libroj, inter kiuj la popularan formon *Mobipocket*, kiun *Sony* ne kapablas trakti. La problemo pri la malapero de supersignitaj literoj en la enhavtabelo ekzistas ankaŭ ĉe *BeBook*, sed oni povas instali alian tiparon kun la necesaj literoj.

Se vi volas aĉeti poŝlegilon, kiu vere elskatole montras Esperanton sen iaj problemoj, tiam vi elektu aparaton en la serio *Pocketbook*. Kaj *Pocketbook 301* (www.pocketbookreader.com/PocketBook301.html), 6-cola, kaj *Pocketbook 360* (www.pocketbookreader.com/PocketBook360.html), 5-cola, bone traktas esperantlingvajn ePub-librojn. Same taŭgus por Esperanto la legilo *JetBook* de la ĉefa firmao *Ectaco*¹.


Baldaŭ iPad

En pluraj landoj baldaŭ haveblos – aŭ eble en la momento, kiam tiu ĉi revunumero atingas vin, jam haveblas – la nova infano de *Apple*: *iPad*. Tiu ĉi aparato apartenas al neniu el la tri cititaj kategorioj, sed oni povus nomi ĝin „poŝlegilo kun multaj aliaj ebloj”, ĉar ĝi servas ankaŭ kiel retumilo, organizilo, kalendaro, ludilo ktp. Tre verŝajne ĝi estos por legantoj de esperantlingvaj e-libroj la plej taŭga elekto. Pro tiuj specialaj ecoj *MONATO* dediĉos al *iPad* apartan artikolon en la venonta numero.

Paŭl PEERAERTS


1. La informo pri *JetBook* baziĝas sur letero de la produktantoj, kiuj promesis sendi foton por pruvi sian aserton, sed ĝis la aperdato de *MONATO* tiu foto ankoraŭ ne alvenis.

En la venonta numero de *MONATO*: *Apple iPad*: ĉu revolucio aŭ evolucio?



Paĝo el *Ĉu rakonti novele?* de Johán Valano en la legprogramo Ibis Reader.

Plia sukceso de Jacques Yvart



La antaŭan diskon *Jacques Yvart kantas Georges Brassens* (Jacques diris: „Georges Brassens, mia artista baptopatro”) aperintan en 1998 mi tiel ŝatis (ne nur pro tio, ke Georges Brassens [jorĵ braséns] estas unu el miaj plej ŝatataj francaj kanzonistoj, sed ankaŭ pro la kantado de Jacques Yvart [jak ivár]), ke mi entuziasme kaptas la ŝancon recenzi la novan diskon de Yvart. Evidentiĝis, ke ankaŭ tiu ĉi, lia dua disko en Esperanto, havas kanton laŭ la muziko de Georges Brassens (*La ĉevaleto*) kune kun 14 aliaj kanzonoj de diversaj aŭtoroj kaj en variaj poeziaj stiloj kaj muzikaj ritmoj. „De longa tempo mi estas vojaĝanto, kaj tiu disko estas la okazo por pluvojaĝi tra la mondo. Kaj Esperanto tre taŭgas por tio.”, diras Jacques.

Kelkajn el la muzikaĵoj sur la disko Jacques Yvart ne nur plenumis (kante kaj gitarakompane), sed ankaŭ aŭtoris (muzikon, tekston aŭ esperantigon). Mi aparte ekŝatis la sentimentaln diskotitolan baladon de Charles Baudelaire [ŝarl bod-lér] (adapto de Marcelo Redoulez [redulé] laŭ traduko de Kalocsay), la plaĉe kortuŝan *La am' por la am'* kaj ankaŭ la ironian *La korpo Eŭropa* kun fajraj ritmo kaj melodio (ĉiuj tri komponitaj de Yvart).

La varieco de uzitaj muzikinstrumentoj (violono, akordiono, pian-klavaro, drumo, kontrabaso, bas-gitaro, mandolino, buzuko, citro) tute ne kaŝas

la agrablan, amikecan basan voĉon de Yvart. Lia prononcado estas klara kaj internacieca. La melodioj kaj muzika aranĝo estas vere ĝuindaj kaj la tekstoj belsonaj kaj pensigaj. Mi rimarkis nur tre malmultajn lingvajn malglataĵojn: notindaj estas la ripeta uzo de *kurento*

kiu france nomiĝas *cistre*).


Kelkloke la akcentaj silaboj de vortoj trafas la neakcentajn poziciojn de la verso – konjekteble la aŭtoroj/tradukintoj ne zorgis eviti tion pro la influo de la silaba franca metriko, kiu esence ne konas vortajn akcentojn. Tio, kvankam fremda al la tradicia Esperanta metriko, plejparte ne impresis min agace kaj eĉ spicis la kantadon per aldona recitativeca karaktero.

Krom la kantoj, sur la disko troviĝas tre plaĉa „videosesio” (plejparte intervjuo kun Jacques Yvart, interalie rivelanta lian homecan sintenon kaj okulfrapan karismon), kaj ankaŭ aparta dosierujo kun karaokaj variaĵoj de ĉiuj kantoj. La diskon akompanas eleganta broŝureto kun tekstoj de ĉiuj kantoj, karikaturaj portretoj de la kunlaborantoj kaj bazaj informoj pri la disko kaj la roloj de la kontribuintoj.

Ĉiuj kantoj sur la disko sonas freŝe, sincere kaj el-kore kaj estas memoreblaj, pensigaj kaj ĉarmaj. Mi

gratulas Jacques Yvart kaj ĉiujn kunlaborantojn pri la nova sukceso! Resume: aŭskultinte tiun ĉi diskon plurdekon da fojoj – kaj ĉiam ĝue! – mi varme rekomendas ĝin ankaŭ al vi!

Alexander SHLAFAER



en la senco de (evidente neelektra) fluo en *Homo kaj Maro* („porte sur la kurent' al la Maro Sargasa”) kaj la misuzon de *bruli* kvazaŭ ĝi estus transitiva en „la vero ilin ekbrulas” en *Magelanoj de l' Universo* (tion mi sufiĉe ofte rimarkis ĉe francelingvanoj). La instrumentonomo *cistro* sur la dorsa kovrilpaĝo verŝajne devus esti *citro* (la fundamenta vorto, kiun – laŭ Reta Vortaro – pluraj vortaroj uzas ankaŭ por la instrumento,

Jacques Yvart: *Invito por vojaĝo*. Eld. Vinilkosmo, Donnevillle, 2008.

Prezo ĉe Flandra Esperanto-Ligo: 24 EUR + afranko.

La malĵaluzo de Klorinda

La violonĉelistino Klorinda, bela admirata laŭdata estrino de la mondfama kordkvaropo „Kanalis”, descendas de la jeta ŝtupareto. Neniu fotoraportisto atendis ŝin. Ŝi vojaĝis inkognite, defendata de nigraj okulvitroj kaj vasta ĉapelrandajo kaj abunda skarpo. La muzikistino ekzakte zorgas por gardi sian brilan profesion aktivecon nete apartan disde sia sekreta amor-vivo. Jam de ses jaroj ŝi estas la pasia aman-tino de Tankredi: belstatura, muskola viro, vegetarano, arda amanto, sed mo-

desta bastubjisto en urbeto bando. Neniu en la mondo povus tion imagi.

Nur nun, post ses jaroj, ĝena epizodeto enigis la unuan makuleton en tiun perfektan amor-rilaton.

Jen kial Klorinda descendas laŭ la jeta ŝtuparo rapide, sed ne tiel gaje-pimpe kiel kutime. Ĉi-foje ŝin ne atendas malsupre la bela Tankredi. Ĉi-foje ŝi alvenas tute neanoncite. Eĉ al la koleginoj de la kordkvaropo ŝi vorton ne diris. Ĉi-foje temas pri strikte persona solvenda



LUIGIOS

afero. Ŝia alveno estos surpriza donaco por la amato.

La danĝera epizodeto okazis antaŭ monato, dum ŝia lasta alveno. Tiam li aŭdacis preskaŭ primoketi ŝin. Neforge-seble!

Plurfoje, akompanante ŝin al sia apudrivera hejmo en la urbeto Riverpon-to, la bela Tankredi estis varme salutata de junaj elegantaj virinoj; kelkfoje ili ameme ĉirkaŭbrakis kaj kisetis lin sur-vange, kiel oni kutimas en tiu ĉi bolanta suda lando. Kutima signo de amikeco, tute sena je amorsignifoj. Sed la lastan fojon mezaĝa rondvizaĝa diketa alta vi-rino, renkontita en la subtrairejo de la flughaveno, kvazaŭ ĵetiĝis en liajn bra-kojn kaj tro ameme kisis lin: survange ja ... sed dum fuĝa tempero eĉ surbuŝe! La apartaĵeto ne fuĝis de la Klorinda agla okulo. Tio inside enŝteliĝis en la Klorin-dan menson. Ĝi turmentis ŝin malfru-vespere, kiam, post elĉerpaj muzik-ek-zercadoj, ŝi vane atendis la endormiĝon en sia verda liteto.

Per si mem tiu fuĝema liptuŝeto po-



SHAMBALLAH

vintus esti rapide forgesita. Bedaŭrinde ĝin sekvis ĝena malbongusta kvereleto:

„Kiu estis?” demandis Klorinda per neŭtrala tono, kiam la du interkisin-toj disiĝis kun reciprokaj promesoj pri baldaŭa revidiĝo.

„Kolegino de la bando”, li respondis per same neŭtrala aplomba tono; „ŝi estas la unua hobojo”.

„Ĉu tiel varmaj estas viaj rilatoj kun ĉiuj bandanoj?” ŝi rimarkigis kun pinĉopreno da spit-humuro en la voĉo.

Jen la eraro! Li tuj rigardis ŝin humur-ŝerce: „Ĉu ĵaluza?”

Kvazaŭ mordita de aspidio, Klorinda eksaltis kaj ektorentis:

„Ĵaluza MI??? Karulo, mi konstatas, ke kvankam ni estas kune de ses jaroj,

vi ankoraŭ malmulte konas min! Vi ja devus esti parkerinta, ke mi ne scias, kio estas ĵaluzo!”

„Nu, trankviliĝu, karulino. Ŝajnis al mi ...”

„Ŝajnis erare! Vi bonege scias, kion mi pensas pri tio. Ĵaluzo! Ah! la plej stulta, malnobla sento, kiun homo povas gastigi en si. Krome: tute vana senutila memleza ...”

„Sed ... kara ... diru al mi: ĉu vi iam troviĝis en situacio, kie vi povus ĵaluzi?”

„ĈU MI???!!!” ŝi kriĉis akcipitre. „Ĉu vi blagas? Neniam en mia vivo!”

„Do vi ne povas eĉ scii, pri kio temas ... Mi vetas: se vin trafus taŭga situacio, vi povus ja ekĵaluzi, samkiel ni ĉiuj teranoj. Ja vi ne estas alimonda estaĵo ...”

„Ah, ĉesu, mi petas! Mi neniam konis, konas aŭ konos la ‘ĵaluzon’; en ia ajn situacio mi nur MALĴALUZON konas! Memoru tion, karulo!!!”

„... Nu nu, karulino, mi pentas, se mi ofendis vin, mi pardonpetas, ni lasu tion, jen preta taksio ...!”

Eta sed potenciale danĝera epizodo, plej rapide forviŝenda. Klorinda, kromnomata de la koleginoj „Vulkanino”, decidis: oni tuj realigu la revon de la kordkvaropo: plenumi koncerton en Santorino, arta urbeto en la lando de Tankredi, ne tro malproksime de Riverponto. La aŭditorio de Santorino estas ja la sekreta celo de ĉiu ajn altnivela klasikmuzika ensemblo. Kaj de Santorino oni atingas Riverponton per apenaŭ duonhora flugeto ... Jen perfekta solvo, facila senĝena maniero por tuj nuligi la tiklan dorneton



enŝoviĝintan en la Klorindan menson ekde la lasta amorvizio.

Senprokraste Klorinda ĉion organizis. Kaj la koncerto okazis, kun granda sukceso kaj fina ovacio kaj entuziasmaj laŭdoj fare de la lokaj kritikistoj. Post la koncerto Klorinda simple diris al la kolegoj: „Mi restas tie ĉi kelkajn tagojn, ni revidiĝos hejme la venontan semajnon, ĝis kaj kis”. Sen pluaj klarigoj ŝi trafis lokan aviadileton por atingi la urbeton de Tankredi.

Do jen Klorinda, kiu, bone konante la kvartalon, pensorapide atingas per taksio lian domon. Ŝi eniras la ĝardenon kun forte batanta koro; ŝi pensas, kiel grandegan surprizon ŝi okazigos al li per tiu neatendata, subita ekapero! Ŝi eniras la grandan kuirejo-restadejon. Strange, la mebloj delokiĝis. La tablo estas en la mezo de la ĉambro, kaj nenio

troviĝas sur ĝi, krom du tranĉaĵoj da viando sur blanka faruno. Tankredi sidas apud la tablo kaj platigas per viandobatilo la ruĝkolorajn tranĉaĵojn. Li tute ne ŝajnas surprizita. Lia vizaĝo restas senesprima, indiferenta. Klorinda haltas ĉe la sojlo kaj rigardas lin. Li trankvile klarigas: „Mi trovis ĉi tiun viandon en la fridoŝranko; mi preparas ĝin por rostado.” Klorinda mire staras sur la sojlo gapante. Tiam eniras la kuirejon mezaĝa rondvizaĝa diketa alta virino. Ŝi ne rigardas al Klorinda, nur kviete preterpasas la viron kaj haltas en ĉambroangulo. Ŝi surhavas normalan hejman laborveston. Evidente ŝi loĝas tie ĉi!

La koro de Klorinda frostiĝas. Neeltenebla dolorego ekplenigas ŝian tutan enon ... kaj ŝi vekiĝas, kovrita de malvarma ŝvito en sia verda liteto. Akra tenajla premo plu dolorigas ŝin: li apartenas al alia virino. Post tempero ŝi

komprenas, „estis nur sonĝo!”, sed samtempe fulmopenso trafas ŝin: „Do ankaŭ mi kapablas ĵaluzi!”

Julia SIGMOND kaj Sen RODIN



**Kontribuojn por la rubriko
Noveloj de Monato
kunlaborantoj sendu al
novelo@monato.net.**




Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL:
tradicia bindita versio: 24 EUR + afranko;
elektronikaj versioj: 14,40 EUR.

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.
La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.
Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Frandaĵo por kleruloj



Antaŭ deko da jaroj, en 1998, aperis tre promesplena poemaro, *Sur Parnaso*, kaj la antaŭparolo de William Auld klasis ĝian aŭtoron kiel poeton ĝisostan kaj vere dediĉitan al sia arto. Temis tiam pri ses poemcikloj, plejparte el sonetoj, tamen kun ne malgrava parto el rondeloj; la temoj estis pri socio, kontraŭ la milito, pri la esperantista medio, pri amatino. Surprizis tiam la kapablo ĵongli per la vortoj, la ne kunigo, tamen apudigo de bildoj kaj vortradikoj,

la peno trudata al la leganto kompreni la delikatecon de iuj bildoj, la sinsekvon de emocioj, la aluditajn eventojn, spekulantajn ofte nur epizodojn de kroniko, ne ja mondskuajn faktojn. Ne temis tamen tiam pri absoluta debuto; la aŭtoro, Timothy Brian Carr, angla bibliotekisto, ĉeestis jam, eĉ se lastapaĝe, en la dua eldono de *Esperanta antologio*, kiu registras poemojn ĝis 1981: li do aperis tie kiel lasta alveninto (fakte nur en 1981 li aperas en la poezia kampo), per unu sola

kontribuo. Kiu tamen atentis tiun kontribuon, povis facile prognozi, ke tiu poeto havas multon dirindan. Liaj tiamaj versoj spegulis samreflekte kaj la densan de Miĥalski kaj la muzikon de Hohlov.

La kariero de Carr pluis diversrevue: premiita en Belartaj Konkursoj kaj en la Floraj Ludoj ekde 1985, konstanta kunlaboranto de *Fonto* kaj de *Literatura foiro*, al li estis dediĉitaj pluraj recenzoj, kaj li estis menciita en eseoj pri la lastatempaj atingoj de la esperanta poezio. La rigoro de lia versado igis lin gajni la nomon de *novparnasisto* kune kun la poetino Krys Ungar, dek jarojn pli juna ol Carr naskiĝdate kaj duonon de tiom poezidebute.

237 sonetoj

Kiuj estas do la karakterizoj de ĉi tiu nova versvolumo, venanta, kiam la poeto jam preterpasis la sesdek-kvinan jaron? Nu, tutunue temas nur pri sonetoj: ducent tridek sep (!) sonetoj. Eĉ en naciaj literaturoj malfacile troveblas tia kvanto da fiksformaj poeziaĵoj ĉe unu sola poeto. Due: dum la unua kolekto estis dividita laŭ cikloj, la nuna dividado ne havas, kaj la poeziaĵoj estas apudigitaj preskaŭ sen videbla kriterio: nek de temo nek de tempo. Surprizas ankaŭ, ke pluraj sonetoj venas de tempo antaŭ la apero de la unua poemaro.

La perfekteco de la ritmo, de la versado, de la rimoj, de la akcentoj iĝis preskaŭ obsede rigora: neniu elizio, la vortoj fluas facile kiel pura akvo; elizioj ja mankas, sed kunmetitaj vortoj eĉ tute nekutimaj abundas. Sed por ĝui tiom da estetikaj kvalitoj la leganto devas sidi komforte, havi ĉe si jarkolektojn de sportaj gazetoj, vortarojn anglan, fran-



plej altan estetikon, komplezan al si mem: Certe Carr perceptas tian poezipurecon kaj fieras (prave) pri ĝi, sed oni havas la impreson, ke li verkas nur por si kaj por elita aro da altkulturaj konsumantoj. Do prefere oni lasu sin luli per la muziko de la versoj ol klopodi kompreni la politikan aŭ sportan aŭ teatran eventon, kiun tiu versmelodio aludas. Paĝon post paĝo la leganto renkontiĝos kun la itala opero kaj kun la filmoj de Laurence Olivier, kaj kun multo alia. Yvonne estas virino, kiu aperas, sub la nomo Ivona, en la dua duono de la libro.

can, latinan kaj italan kaj de la lingvoj (iam) parolataj en regionoj de Britio kaj Francio, koni la latinan lingvon aŭ almenaŭ ofte ripetitajn latinajn frazojn, koni Iliadon, Odiseadon, Eneidon, Danton, Ŝekspiron, la anglan literaturon, francajn aŭtorojn ktp. Nu, eble tion oni povus postuli de tre klera okcidentano, kiu studis en klasika linceo; kaj tiel kompreni, ke *timeo Danaos et dona ferentes* estas „mi timas helenojn, eĉ kiam ili alportas donacojn” (tradukoj de tiuj „dediĉaj” frazoj apenaŭ estas).

Dolĉversaj puzloj

Alia defio estas la esperantigo de la propraj nomoj, kio ne estas tute kutima en nia lingvo: do leganto devas diveni, ke Joĉjo Halideo estas Johnny Hallyday, mondfama rokmuzikisto; ke Ĵandarka estas Jeanne d’Arc, Kopoidoj estas la idoj de Kopa, franca futbalisto fama antaŭ kelkdek jaroj; kaj ke Ĉeniero estas Andreo Chenier ktp. Kaj krome nepras scii pri filmoj kaj aktoroj, pri muzikistaj bandoj, pri sportaj, precipe futbalaj matĉoj, gajnataj aŭ malgajnataj de la francaj aŭ britaj naciaj teamoj dum sia historio; nepras koni la tiamajn ludantojn, kaj je kiuj respektivaj poentoj finiĝis la matĉoj ktp. Se leganto tion ne konas, li troviĝas antaŭ tre dolĉversaj puzloj, tre belsonaj vortoj, tre graciaj kaj tute malbanalaj rimoj, sed laŭsence ofte nedeĉifreblaj poemoj, ĉar la aludoj estas obskuraj. Li trovos puran formon,

La amo estas pli intuiciata ol rakontata, sed tiu estas la plej bela parto de la sonetaro.

Konscie pri la fakto, ke multegaj aludoj estas nekompreneblaj al la ĝenerala publiko, Carr enmetis kelkajn klarigajn notojn, sed vere ili apenaŭas. Jen unu lia soneto, titolita *Elizabetano*, kiu havas franclingvan unulinian enkondukon el Niderst pri Racine:

Ombrante Ilirion per komploto
li persektas sobran Malvolion.
Ŝajlokon reduktinte al bankroto,
li trudas al li sian religion.
(Cirkestro de pajaco sur golgoto
se bistro ŝanĝas viron en bestion.)
Per peĉo de malica patrioto
li skribas pri Ĵandarka kalumnion.
„Ree, amikoj! Ree en la breĉon!”
Ĉu li komandus futbaltuliganojn?
Anglio plu eksportas sian feĉon,
li apartigas por la loka bando
francojn, nigrulon, judon, puritanojn.
Venkinta duko mankas ĉe normando.

En aliaj sonetoj la ritmo vin trenas impulse: preskaŭ sen spirpermesa interpunkcio, tiel ke vi ensorbas tro rapide la versojn, kaj devas relegi. Ĝuu la ritmon kaj la fluon malrapide; ĝi indas vian halteton kaj atenton.

Carlo MINNAJA

Timothy Brian Carr: *Yvonne*. Rotterdam, Bero, 2009, 252 paĝoj broŝurita.

Prezo ĉe FEL: 15,90 eŭroj + afranko.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Varmbotelo

Iam mi legis interesan aserton, ke „la francoj havas seksumadon, la angloj varmbotelojn”. Mi rememoris tiun profundan diraĵon, kiam mi aŭskultis programon dissendatan de la irlanda ŝtata televid-instanco. La parolanto deklaris sin fascinita de la diverslingvaj tradukoj de la vorto *varmbotelo*.

Kie mi loĝis en Sud-Ameriko, tiu koncepto kaj la responda objekto estis nekonataj. Oni eĉ deklaris (malĝuste), ke en la hispana lingvo la vorto ne ekzistas. Povas esti, ke en la varmegaj tropikaj zonoj de tiu vasta kontinento, varmentaj boteloj neniam estas bezonataj, sed estas loko, kiel ekzemple, Patagonio, kie la vintroj estas terure malvarmaj, kun neĝo, glacio kaj eĉ glaciriveroj.

En pasintaj jarcentoj, la skotoj, kiuj loĝas en malseka, malvarma lando de montoj kaj arbaroj, dumvintre kutimis meti en siajn litojn pokalojn faritajn el

bakita argilo, kaj enhavantajn varman akvon. Tiuj prauloj de la varmbotelo nomiĝis „porkoj”, kiujn ili iomete similis.

Sed, kiel diras niaj francaj geamikoj, „ni revenu al niaj ŝafoj” aŭ, pli ĝuste, al la menciita irlanda radi-parolanto. Li diris, ke li esploris la temon kaj aparte amuziĝis pri la germana ekvivalento *Gummiwärmflasche*, kiun li trovis en supozeble malnova germana vortaro. Li certe ankaŭ malkovris, ke la hispanoj nomas tiun objekton „bolsa de agua caliente”; la portugaloj „bolsa de água quente”; la italoj „borsa dell’acqua calda”, la skotgaeloj „botal-teth” ktp. La lasta estas simila al la irlandgaela „buidéal te”. Kurioze, la dua elemento en ambaŭ gaelaj frazoj iom sonas kiel la vorto kiu signifas *teon*.

Tio memorigas al mi, ke kiam mi loĝis en montara regiono en Portugalio,

kie la vintroj estas ege malvarmaj, iu najbarino mia en iu vespero vizitis amikino kaj iom embarasiĝis, ĉar ŝi trovis ŝin jam en noktovesto, kaj evidente preta por enlitiĝi. La amikino, tamen, bonvenigis mian najbarinon, kaj proponis al ŝi tason da teo. „Ne, ne”, respondis la najbarino, „mi ne volas ĝeni vin je ĉi tiu horo”. „Vi tute ne ĝenas min”, respondis la amikino. „La teo estas jam preta”. Tiam ŝi foriris al sia dormoĉambro, kaj revenis kun varmbotelo. „Mi ĉiam plenigas mian varmbotelon per varma teo; tial, se mi deziras ion trinki dumnokte, mi povas elverŝi tasplenon. Samtempe la botelo varmigas al mi la piedojn.”

Tia inventemo estas laŭdinda. Ankaŭ la genio de la homo, kiu inventis la varmbotelon. Pri la seksumado mi ne komentos.

Garvan MAKAJ



anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



LA GRAFO DE MONTE- KRISTO

**La vivoverko de
Alexandre Dumas kaj
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand**

Oni kutimas konsideri la libron *La Grafo de Monte-Kristo* kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian juncon, lian feliĉon.

A. DUMAS



**LA GRAFO DE
MONTE-
KRISTO**

FEL

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio (en 2 volumoj): formato 135 x 210 mm, pezo 1333 g, 1184 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-43-0; prezo ĉe FEL: 96 EUR (inkluzive de registrita afranko).

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 32 EUR